



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2004, numero 4-a: septembro / decembro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de novembro



La 5-an de julio kunvenis en Les Brenets la junaj esperanto-lernantoj Véronique Jean-Mairet, Raphaël Sommer, Sabrina Voutat kaj Luc Allemand. Mireille Grosjean fotis ilin dum ilia pilgrimo al la memorŝildo pri Edouard Ducommun.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
2303 La Chaux-de-Fonds.

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Andy Künzli,
Richard Schneller.

SES informas

Redaktaj datlimoj

por la venonta jaro

2005-1: januaro-februaro: decembre 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

2005-2: marto-majo: februare 15. Mencio
de informoj ekde la 15-a de marto.

2005-3: junio-aŭgusto : maje 15. Mencio
de informoj ekde la 15-a de junio.

2005-4: septembro-oktobro: aŭguste 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

2005-5: novembro-decembro: oktobre
15. Mencio de informoj ekde la 15-a de
novembro.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59. Ret-
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto, PF 301,
8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto:
info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto, Grand-
Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18
88. Retpoŝto: mireille.grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67. Ret-
poŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 MuttENZ 1.
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: [esperanto-
servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

Chiara Fabbri, peranto itallingva kaj junul-
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:
chiara-fp@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-
Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr.10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	Paroj	"
fr. 70	Patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

Novembre

- 1: Lausanne: LES: Kunveno.
- 3: Wil: EKW: Kunveno.
- 2: Genève: La Stelo: Kunveno.
- 3: Luzern: LES: Kunveno.
- 11: Basel: ESB: Kunveno.
- 20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Decembre

- 1: Luzern: LES: Kunveno.
- 1: Wil: EKW: Zamenhofa festo.
- 7: Genève: La Stelo: Kunveno.
- 12: Lausanne: LES: Zamenhofa festo.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.

2005

Bonan kaj fruktodonan jaron al ĉiuj konsultantoj de la svisa kalendaro deziras la redakcio de *SES informas*.

Januare

- 8: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Februare

- 5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Marte

- 1: Genève: La Stelo: Ĝenerala kunveno.
- 5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Aprile

- 16: Zürich: Ĝenerala Jara Kunveno de SES.

Maje

- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Junie

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Julie

- 23-30: Vilno: 90-a Universala Kongreso

Aŭguste

- 15: Redakta datlimo de SES informas.

Septembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.

Oktobre

- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Novembre

- 5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.
- 19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Decembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
- 15: Redakta datlimo de SES informas.

Komprennebele anoncelbas en la svisa kalendaro kaj ankaŭ en la rubrikoj de la bulteno nur aranĝoj, kiuj estis anoncitaj al la redaktoro.

Vivo de SES

Ĝenerala Kunveno 2005 Zürich – 16-an de aprilo

Ĉiuj bonvolu noti en sia agendo, ke la Ĝenerala Kunveno 2005 de SES okazos en Zürich la sabaton 16-an de aprilo. Detalaj informoj aperos en la venonta numero 2005-1 (januaro-februaro) de *SES informas*.

Mono por SES-agado

Baldaŭ novembro, tempo por pensi al donacoj. Konsideru bonvole ankaŭ al SES, kiu daŭre bezonas monon por informado kaj varbado pri esperanto. La kotizoj sufiĉas por la interna, sed ne por la ekstera agado, kiu estas senlima, sed limigita pro manko de mono.

Jen kelkaj ekzemploj de SES-subteno al projektoj :

SES helpas finance eldoni svisan enciklopedion pri esperanto, kiun verkas Andy Künzli helpata de Claude Gacond.

SES subvencias kampanjon kaj projekton de la esperanto-grupoj de Genève kaj Lausanne.

SES kontribuas finance al plua funkciado de la Komunikad-Centro en Bruselo.

Ankaŭ en 2005 SES volas subteni gravajn planojn kaj tial bezonas rimedojn por eksterordinara agado.

Se vi deziras lanĉi kaj sponsori personan ideon, tiam prenu kontakton kun ni. Ni provos faciligi ĝian realigon. Se vi simple kontribuas mone laŭ via eblo, uzu la enmetitan engajilon indikante « Agado 2005 ». Multan dankon pro via helpemo.

Bruno Graf, prezidanto.

Memortabulo L. L. Zamenhof

Memortabulo pri Zamenhof retrovas la vojon al SES kaj atestas la pioniran epokon en Bern. Kiu sciis, ke en la tiama hotelo Beau-Site, kie hodiaŭ estas kliniko, pendis memortabulo L.L. Zamenhof? La heredantoj mesaĝis tion post vendo kaj malpleno de la domego.

La memortabulo el fero, kiu mezuras 44 x 37 cm, montras la kapon de Zamenhof, lian subskribon kaj portas la mencion „Aŭtoro de Esperanto“. Ĝi estas impona bildo pri lia personeco.

La heredantoj estas kuracista familio Zbinden el Bern. La kliniko Beau-Site apartenis al la avo, kiu mortis lastjare. Kiam la kliniko estis vendita, la avino memoris pri tiu tabulo kaj pensis, ke

ĝi reiru al esperanta asocio, se tia ankoraŭ ekzistas. Tiel mi ricevis retroŝton de la filo, ankaŭ kuracisto kaj profesoro kiel la patro, kun la demando, ĉu ni deziras repreni la memortabulon. Mi ne dubis momenton kaj tuj retroŝtis, ke ni akceptas la kulturalan valoraĵon kun fiero.

La memortabulo estis prezentita dum la SES-kunveno en Bern la 23-an de oktobro kaj Claude Gacond ĝin transprenis por konservado ĉe CDELI.

La tabulo restos en nia arkivo ĉe CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Eble troviĝos digna loko por refiksi ĝin ie.

Bruno Graf

SES kunlaboras kun Eŭropa Esperanto-Unio Raporto de Nicole Margot

Oni povis rimarki lastatempe, ke Eŭropa Unio kreis ian dinamismon inter eŭropaj esperantistoj:

La 1-an de aprilo estis voĉdonita en la Eŭropa Parlamento amendo de deputito, membro de la radikala partio, pri studado de la neŭtrala lingvo esperanto kiel pontlingvo en tradukado. Ege gravas, ke unuafoje oni diskutis kaj voĉdonis pri esperanto en tiu parlamento. La amendo estis

akceptita de 40% de la ĉeestantaj parlamentanoj. Se oni konsideras, ke voĉdonado okazis pere de levitaj manoj, ke deputitoj timis la rigardon de aliaj, tiu rezulto estas tre kontentiga.

La 9-an de majo 300 homoj kunvenis en Strasburgo por bunte kaj ĝoje manifestacii favore al respekto de plurlingvismo en Eŭropa Unio.

La 10-an de junio 2004 la balota listo Esperanto Demokratia Eŭropo prezentiĝis al la eŭropaj elektoj kaj ricevis honorindan rezulton konsidere la malfacilaĵojn por nova listo prezentiĝi en tiu balotado.

Kvankam tiuj eventoj ne rekte rilatas kun la asocio Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), ili same partoprenas tutan dinamikan etoson.

Kiam Universala Kongreso okazas ekstereŭrope, EEU organizas proprajn kongresojn. Jen la listo de la ĝisnunaj : 1992 : Italio ; 1995 : Paris, 1996 : Stuttgart ; 2000 : Oostende ; 2002 : Verona ; 2004 : Bilbao.

Statuto

Fine de aŭgusto 2004, dum la kongreso de Bilbao, voĉdoniĝis nova statuto, kies celoj estas :

1. kunordigi kaj vigligi la agadojn de la esperantoparolantoj de Eŭropo, speciale ĉe la politikaj kaj kulturaj instancoj de Eŭropa Unio (EU), pri-studente kaj kreante kondiĉojn favorajn al la progreso de tiuj agadoj;
2. kontribui al la garantiado de egalaj lingvaj rajtoj por ĉiuj lingvoj indiĝenaj en EU, oficialaj, minoritataj aŭ regionaj;
3. fortigi eŭropan konscion ĉe la civitanoj en Eŭropa Unio. La tuta statuta teksto troviĝas je. lingvo.org/eo/4/795

Brusela Komunikadcentro

Por havi pli rektajn kaj efikajn rilatojn kun la diversaj instancoj de EU, Eŭropa Esperanto-Unio fondis la Bruselan Komunikadcentron (BKC),

kies direktoro estas Dafyd ap Fergus, fakte dungita de Flandra Esperanto-Ligo (FEL), same kiel Marko Naoki Lins, ĉar EEU ne havis juran personecon. Dum du jaroj UEA finance subtenis la komunikadcentron, kondiĉe ke BKC konkrete kontribuu al la laborplano de UEA. Je la fino de la jaro 2003, UEA ĉesis financi la centron, kaj la esperantistaro, konscia pri la tre utila laboro de la centro, amase respondis al la financa alvoko de la kasisto de EEU, tiam, Johan Derks. Danke al tiu subteno la komunikadcentro povis pluvivi ankoraŭ unu jaron, sed ĝi estas nun tre forte minacata. BKC interalie efike stimulas la landajn asociojn al gazetara informado, disponigante artikolojn, luktas kontraŭ lingva diskriminacio en EU (ĝi ekzemple listigis kaj denunciis plurajn centojn da dunganoncoj, kie oni postulas, de eventualaj kandidatoj, la anglan lingvon kiel gepatran), regule aperigas *Eŭropan Bultenon* kun artikoloj, kiuj informas pri EU :

<http://lingvo.org>

Estraro kaj membroj

Dum la kongreso de Bilbao la prezidanto Sean O'Rian estis reelektita same kiel la vicprezidanto Flory Witdoekt. Zlatko Tišljar estis elektita sekretario. Kasisto ankoraŭ ne estis trovita.

Kiu povas membri en EEU? Ni devone citu la statuton. Krom la honoraj membroj ekzistas du kategorioj da membroj:

1. Efektivaj membroj estas esperantaj asocioj de la diversaj landoj de Eŭropa Unio, kiuj akceptas ĉi tiun statuton kaj nomumis reprezentanton kaj anstataŭanton por sia partopreno en la aferoj de EEU. La asocio normale akceptas kiel efektivajn membrojn nur unu asocion el ĉiu lando. Reprezentantoj de la efektivaj membroj rajtas partopreni la Ĝeneralan Asembleon de EEU kun decidpova voĉo. Anstataŭantoj rajtas partopreni la Ĝeneralan Asembleon, sed havas voĉdonrajton, nur kiam la respektiva reprezentanto ne ĉeestas.

2. Observantaj membroj estas asocioj de landoj aŭ regionoj de Eŭropo, kiuj akceptas ĉi tiun statuton, sed laŭ la ĉi-supraj kriterioj ne povas esti efektivaj membroj, kaj kiuj nomumis reprezentanton kaj anstataŭanton por sia partopreno en la aferoj de EEU. Reprezentantoj kaj anstataŭantoj de la observantaj membroj rajtas partopreni la Ĝeneralan Asembleon, sed ne havas voĉdonrajton.

SES-aliĝo

Ekde tiu jaro 2004 Svisa Esperanto-Societo aliĝis kaj mi ĉeestis la kongreson de Bilbao laŭ la kondiĉoj de observanta membro. Ne ĉiam agrablas estis sen decidpovo, sed tre interesis min iom kliniĝi super la realo de EU, ĉefe kun esperantistoj, kiuj havas al la afero pli humanisman rigardon kun aspiro al demokrateco, tio kio ne ĉiam respeguliĝas en la artikoloj, kiujn ni povas legi en niaj gazetoj. Gravus por SES ne izoliĝi de tiu tuteŭropa dinamismo.

Kelkaj punktoj diskutitaj antaŭ, dum, kaj post la kongreso de Bilbao

Inter la diversaj zorgoj kaj proponoj de la komitato mi povas reliefigi, laŭ mi, la plej gravajn:

Post la agnosko de esperanto kiel vivanta lingvo instruinda je ĉiu nivelo fare de Hungario, EEU, apogante sin sur la fakto, ke nun unu membra ŝtato de EU agnoskis esperanton, instigas siajn membrojn agi samdirekten. Kaj tia agado unue konkretiĝas en Francio, kie la prezidanto de UFE Claude Longue-Épée skribis leterojn al la novaj eŭrop-deputitoj, al la respublika prezidanto Jacques Chirac por remomorigi promeson faritan okaze de UK en Montpeliero, kaj al la ministro pri nacia klerigado.

Estis lanĉita la ideo krei parlamentan grupon kun homoj konsciaj pri lingva diskriminacio en EU kaj pri la utilo de la internacia lingvo esperanto.

La eŭropa himno estis tradukita en esperanton kaj la celo estas enkonduki

tiun tradukon kiel oficialan.
(<http://lingvo.org/eo/4/775>)

Jen la rezolucio, kiu estis voĉdone akceptita fine de la kongreso :

REZOLUCIO DE BILBAO

Kunveninte okaze de la 6-a Eŭropa Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Bilbao de la 25-a ĝis la 28-a de aŭgusto 2004, la 284 partoprenantoj el 24 landoj:

Substrekas, ke la homaranisma principaro de la Esperanto-movado, kaj ĝia celo al libera interkompreniĝo inter la homoj kaj la popoloj kaj al paco, tute kongruas kun la tuteŭropa volo konstrui Eŭropon enpacigiinta, unueca, harmonia kaj riĉigita de ĝiaj multspecaj kaj multlingvaj kulturoj.

Substrekas sian firman subtenon al la principo de strikta lingva egalrajteco kaj de neŭtrala multlingvismo.

Notas, en la aplikado de tiu principo, la ampleksecon de la teknikaj kaj financaj malfacilaĵoj, kiujn devas alfronti la eŭropuniaj servoj pri tradukado kaj interpretado, kaj kiujn hodiaŭ pligravigas la plivastiĝo de Eŭropa Unio.

Konstatas, ke en la eŭropuniaj instancoj - same kiel en multaj eŭropaj organizaĵoj, eĉ en la eŭropaj membroŝtatoj kaj ties instruadaj sistemoj - pli kaj pli nur unu nacia lingvo estas privilegie konsiderata kiel sola bazlingvo de komunikado kaj informado tiel malfortigante komunan eŭropan identecon.

Konstatas, sekve de tiu privilegio, ankaŭ la lingvan diskriminacion de multegaj dunganoncoj, kiuj proponas

postenojn rezervitaj nur al denaskaj parolantoj de tiu nacia lingvo, kaj kiu tiel iom post iom kreas ties faktan hegemonion.

Kondamnas tiun faktan lingvan hegemonion, kiu kontraŭas ĉiujn principojn de egaleco, objektiveco kaj demokrateco, kiu maljuste favoras iun malplimulton de eŭropaj civitanoj, kaj el kiu aŭtomate fontas kultura, ekonomia, socia kaj politika superregado kaj mallojala konkurenco.

Certas, ke solvo de tiuj problemoj povas kuŝi en la uzo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto, pro ĝiaj ecoj de facileco, precizeco kaj logika konstruo, de prononca homogena kaj de rapida adapteblo, kiel traduka kaj interpreta pivotlingvo en la eŭrop-uniaj instancoj, kaj kiel lingvinstrua helpilo en la instruaj sistemoj de la membroŝtatoj.

Proponas, surbaze de rezolucioj de Unesko de 1954 kaj 1985 pri instruado de Esperanto, kaj de la konkludoj de la raporto "Ĝeneralaj aranĝoj pri multlingvismo", alprenita de la Eŭropa Parlamento en 2004, ke la Eŭropa Parlamento starigu interpartian grupon por funde pristudi la nunajn eŭropajn lingvajn problemojn, la diversajn ekzistantajn solvojn kaj la eblecon proponitan per Esperanto.

Sugestas, ke tiu prilingva grupo rapide iniciatu eksperimentojn - zorge kontrolotajn kaj mezurotajn de fakuloj kaj parlamentanoj - de uzo de Esperanto kiel traduk-interpreta pivotlingvo en la Eŭropa Parlamento, kaj ke ĝi konsilu al ĉiuj membroŝtatoj simile kontrolotajn eksperimentojn pri enkonduko kaj instruado de Esperanto en

iliaj instrusistemoj.
En Bilbao, la 28-an de aŭgusto 2004.

Nicole Margot

Noto : La legantoj, kiuj ne posedas retaliron povas peti la tekston de la statuto kaj de la himno al mi, sendante afrankitan koverton kun sia adreso al : Nicole Margot, Lys 4, 1010 Lausanne.

Donacoj

Donacoj en frankoj ricevitaj ĝis la fino de julio :

al SES: Christina Birchmeier, Zürich: 75; Pierrette Blanchet, Lausanne: 15; David Buhmann, Prilly: 30; Alessandro Calaprice, Allschwil: 25; Tazio Carlevaro, Bellinzona: 50; Lucienne Dovat, Renens: 30; Rolf Ernst-Schubert: Herrliberg: 5.55; Yvette Goy, Cully: 10; Renate Heer, Bern: 35; Anne-Marie Johannot, La Tour-de-Peilz: 50; Eduard Muster, Ecublens: 35; Parzival, Biel: 5; Jimmy Rivière, Prilly: 15; Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, Zürich: 400; Lisette Testaz, Ollon: 30; Armin Weidmann, Uerikon: 35. **Sume: 845.55.**

Agado 2003: Charlotte Blanc-Maillard, Vevey: 15. **Sume: 15.**

Patronoj 2004: Pagis duoblan kotizon, kaj do estas Patronoj 2004: John Hasler, Ostermundigen; Suzanne Streit, Givrins; Marguerite Jayet, Morges; David Buhmann, Prilly; Fritz Hänni, Ittigen; Marianne Hubert, Lausanne; Lisette Testaz, Ollon.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco kaj antaŭdankas pro la atento, kiun ĉiu alportos al la pagilo aldonita al la nuna bulteno.

Mortoj

Ernst Alphons von May-Vogel mortis la 1-an de junio 2004. Li naskiĝis la 16-an de julio 1992. Ĝis sia malsaniĝo li deĵoris kiel sekretario de la Esperanto-Klubo Wil kaj ankaŭ kiel kasisto de SES.

Anne-Marie Briner en Genève

Rudolf Schneebeli en Zürich

Noble estas testamenti

Malofte okazas, ke membroj de SES testamentas sumon al SES. Ĉu ni devus konsili kiel procedi, kiel faris Germana Esperanto-Asocio? Ni hezitis pro diskreteco.

Charlotte Ecklin, Luzern, mortis la 19-an de septembro 2003. Ŝi testaments, ke la heredantoj asigu libere iun sumon favore al Svisa Esperanto-Societo. Tiel ili decidis. Ni ricevis tiun informon de la urba instanco.

En nia letero al la heredantoj ni esprimis nian kortuŝan dankon. Ni konkludis, ke Charlotte Ecklin evidente konsideris la Lingvon Internacian ne nur praktika komunikilo, sed grava kaj valora afero. Estas konate, ke esperanto

akcelas pli bonan interkompreniĝon inter homoj, staras por amikeco kaj paco. Tiuj valoroj daŭre estas aktualaj rigardante la staton de la mondo.

Eble ŝi ankaŭ esperis, ke nia societo daŭrigu pledi por esperanto. Tiel ni

faros. La mono por informi kaj konvinki interesatojn ja neniam sufiĉas. Noble estas testamenti kaj ni agnoskas tian faron.

Bruno Graf, prezidanto

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 55.

Fakso : 032 967 68 29, indiki : por CDELI.

Retadreso : cdeli.vch@ne.ch

Martine.schneller@ne.ch

Claude.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

Nova labor-salono

Post kvarmonata laboriga transformo periodo CDELI nun disponas pri bela kaj pli vasta laborsalono bone ekipita kaj prestiĝe lokita centre de la biblioteka domo, unu etaĝon pli alte ol la freska kunvena salono.

Tiu translokiĝo interrompis la administran kaj kursan aktivecojn de CDELI kaj ankaŭ kaŭzis malakuratigon en la redaktado de la SES-bulteno *SES informas*, kies numero

2004-4 septembra-decembra pro tio estas la lasta de la jaro.

Sed nun ekde la novembro monato, kun nova dinamismo, CDELI povos pli efike zorgi pri sia multfaka taskaro arĥiveja, biblioteka, studeja, rendevueja, kunlaboreja, kvankam en la biblioteka domo plue efektiviĝos gravaj transformaj laboroj kelkfoje perturbigaj. Ekzemple venontjare instaligos lifto, kiu ebligos atingi la CDELI-salonon sen ŝtupare grimpadi tri etaĝojn. Jam nun estas instalita ĉe la centra norda enir-pordo de la biblioteka domo sonorilo, per kiu alvenantoj povas sin anonci. Tiel la aktivecoj de CDELI povos efektiviĝi eĉ ekster la strikta horaro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, kio faciligos la organizon de kunvenoj vesperaj, sabataj, aŭ eĉ semajnfinaj.

Restarto de la studsabatoj

La deviga interrompo de la didaktikaj studsabatoj estis bedaŭrata de multaj studentuloj. Iliaj mesaĝoj nun kuraĝigas restartigi la instru-agadon kun nova orientiĝo. Analizo de la rimarkoj de la partoprenintoj al la studsabatoj instigas nin distingi inter la prilingvaj kaj prikulturaj aranĝoj. Tial ekde nun la didaktikaj stud-

sabatoj, kiuj disvolviĝas laŭ tri paralelaj studrondoj, havos antaŭ ĉio paroligan kaj prigramatikan celojn. Nancy Fontannaz zorgos pri la tutkomencantoj, Claude Gacond instruos per strukturŝanĝaj ekzercoj la komencantojn kaj Monika Molnar per paroligaj ludoj kaj gramatike perfektigaj ekzercoj pliprogresigos la progresantojn. Kiel ĝis nun tiu didaktika aktiveco okazos la trian sabaton de la monato. Kaj la unuan sabaton de la monato en unu sola studrondo disvolviĝos prikultura seminario, kies celo estos kleriga koncerne al la historio de esperanto, al konatiĝo kun la originala literaturo kaj al kontaktoj kun verkistoj. Jen la kalendaro de la venontaj aranĝoj:

Dataro de la venontaj prilingvaj kaj paroligaj didaktikaj studsabatoj: novembre 20, 2005 januare 22, februare 19, marte 19, majo 21, junio 18, oktobre 22, novembre 19.

Dataro de la venontaj kulturaj seminarioj: 2005 januare 8, februare 5, marte 5, junio 4, julio 1, septembre 3, novembre 5, decembre 3.

Horaro

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn, ekzerciĝi gramatike kaj babili kafumante.

10 h 30: Oficiala malfermo, formiĝo de la stud-rondoj.

11 h 00: 1-a studperiodo.

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: 2-a studperiodo.

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: 3-a stud-periodo.

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: 4-a stud-periodo.

16 h 15: Konkluda kunveno.

16 h 30: Teumo, librovendo.

17 h 00: Oficiala fermo.

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studsabatoj ĉiuj bonvolu nepre antaŭ-anonci sian partoprenon al Claude Gacond :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claudio.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, hejme 032 926 52 32.

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno (lern-ejano, studento, metilernanto sen-page). Kiuj ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagos pluse Fr 5.-.

Filmo pri la UK

François Randin realigis filmon pri la UK en Pekino, kies titolo estas *LEKANTO AL PEKINO – la vojaĝo de Marguerite al la UK 2004*. Ĝi estas longdaŭra filmo (90 minutoj – 2 diskoj (DVD) – fr 50.- ambaŭ aŭ alia muntado mezdaŭra (55 minutoj – 1 disko (DVD) – Fr 40.-

François Randin inaŭgure projekcios la longdaŭran version la 1-an de novembro al la membraro de Laŭzana Esperanto-Societo.



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12
Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Novembre 11 : Monata kunveno : pretigo de la nova programo 2005.

Decembre: tago decidota: Zamenhofa festo en Francio.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Esperanto-infos : Tel. : 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20 h 00 en la restoracio «*Aux Cheminots*», Rue des Gares 7, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

Raporto

La 7-an de septembro post la administraj punktoj Anita Altherr, akompanata de sia kara edzo Hans nun 90-jara, prezentis lumbildojn pri la centjariĝo de SES kaj aliaj pri La Stelo. Multaj rekonis sin, aldonis komentojn kaj ridis.

Venontaj kunvenoj

Novembre 2. Monata kunveno je la 20 h 00. Manĝo je la 19 h 00.

Decembre 7. Monata kunveno je la 20 h 00. Manĝo je la 19 h 00.

2005 Marte 1: Ĝenerala jarkunveno.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

Novembre 1: Projekciado de la filmo de François Randin pri la Universala Kongreso en Pekino (Ĉinio).

Decembre 19: Zamenhofa festo, kiun organizos Jacqueline, Yvette kaj Karlota.

Januare 10: Kunveno kun François Randin.

Februare 7: Ĝenerala Asembleo.

Marte 7: Kunveno kun Laurent Burgbacher.

Aprilo 4: Programo decidota.

Maje 2: Programo decidota.



La jubileantoj Jacques kaj Lucienne Dovat-Clément.

En la kabano « Refuge de Renens », la sabaton 17-an de julio, okazis neordinara renkonto. Gesinjoroj Jacques kaj Lucienne Dovat-Clément festis la sesdekan jariĝon de sia geedziĝo okazinta la 29-an de julio 1944 en Oron-la-Ville. Ilin ĉirkaŭis centoj da geamikoj: familianoj, ekskolegoj, samcelanoj, esperantistoj, ktp. por kuncelebri tiun diamantan geedziĝon. Muzike aktorino Rémy Schroeter per plej diversaj instrumentoj, ne nur per alpa korno, kiel okaze de la SES-jubileo en Ouchy-Rolle.

Monkolekto por la filantropa agado « Atelier des Enfants », en la lad-urbo ĉirkaŭanta Lima en Peruo, ebligis direkti fr. 1'406 al Fondumo en Oron-la-Ville, la devena loko de Christiane Ramseyer, la fondintino de tiu agado antaŭ 25 jaroj, kiu daŭre laboradas en Lima.

Ankoraŭ longan geedzan vivon travivu niaj gesamideanoj, jen la espero, kiun esprimis la partoprenantoj al la diamantaj geedzoj.

Ili fakte restis tre aktivaj. Ekzemple, kadre de la agado Feria Pasporto, ili

gastigis ĉi-somere la 6-an kaj 8-an de julio kaj la 2-an kaj 4-an de aŭgusto entute 25 geknabojn, kiuj venis informiĝi pri esperanto. Jacques Dovat iris akcepti la infanojn ĉe la metroo por la renkontiĝo, kiu okazis en la Dovat-hejmo de la 14 h 00 ĝis la 17 h 00. Lucienne Dovat montris al ili interesan filmon pri esperanto, kaj poste paroligis ilin en esperanto rikmetode. Ŝi aŭdigis kaseton kun diversaj esperantaj voĉoj kaj kantoj. Ilia filino Jacqueline Vasserot aŭ foje Nancy Fontannaz ankaŭ ĉeestis la posttagmezon. Dum konkluda manĝeto la infanoj povis sin libere esprimi. Ĉiuj rakontis la kaŭzon de sia aliĝo al tiu 292-a proponita punkto de la FERIA Pasporto. Estis ĝenerale ĉu pro lingva intereso, ĉu ĉar avo aŭ parenco praktikas aŭ favoras esperanton. La konkludo de multaj infanoj estis : « *Esperanto, c'est génial !* »

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:

Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, atingebla de la stacidomo per la trolebusoj 4 kaj 5.

Restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14.

Raporto

Ekskurso de Lucerna Esperanto-Societo.

Belega, suna tago favoris la someran ekskurson de Lucerna Esperanto-Societo la 7-an de aŭgusto. Sub la gvido de Louise Bachmann kaj Rosa Mettler naŭ LES-anoj aŭtomobile veturis al la *Tropenhaus*

(*Tropika domo*) proksime de Ruswil/LU. Per varma akvo, kromprodukto de granda instalaĵo por la densigo de la tera gaso, kiu en tuboj trafluas Svislandon, oni hejtas vitran domegon. En ĝi abunde kreskas multaj tropikaj plantoj kaj oni rikoltas diverspecajn bananojn, mangojn, papajojn, citronojn, kapsiketojn kaj diversajn aliajn. Pere de lertaj klarigoj de la gvidisto ni lernis kaj miris pri la kondiĉoj sub kiuj tiuj plantoj prosperas. La plantoj estas akvumigitaj unuope pere de tubetoj rekte al la radikoj, ne kiel oni povus pensi per artefarita pluvo de supre. La plantaro kreskas sub biologiaj kondiĉoj, la nura nutraĵo estas fiŝsterko el fiŝoj tenataj en grandaj akvarioj. Aŭstraliaj kokcinoj helpas batali kontraŭ afidoj, nederlandaj burdoj estas uzataj anstataŭ abeloj.

La produktoj vendiĝas al lokaj restoracioj kaj al la vizitantoj. La LES-anoj ne maltrafis la eblon gustumi papajan glaciaĵon, ege bonvena post horo en tropikaj kondiĉoj de 33° da varmeĉo kaj 85° da humideĉo.

Sekvis la distra parto de la ekskurso kun aperitivo kaj vespermanĝo de frititaj terpomoj kaj ovaĵo ĉe LES-anino Monika Ruckli, kiu afable estis invitinta nin. Amuza skeĉo kune kun la sperta akordeonisto Paul Scherer finfine gvidis al la kantado de esperanto- kaj popol-kantoj kaj donis bonhumoran finon al sukcesplena tago.

Sonja Brun

Kunvenoj

Novembre 3: Simplon: 14 h 00-16 h 00: Konversacio kun Franz Brügger.

Decembre 1: Steghof: 14 h 00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14 h 30 kun Paul Scherer: Zamenhofologio kaj programo 2005.

2005 januare 5: Simplon: 14 h 00-16 h 00: Konversacio kun Franz Brügger.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE
Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.
Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER.
Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil.
Tel.: 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Esperanto-Klubo Wil festis 40-jaran jubileon

La 2-an de junio Esperanto-Klubo Wil festis 40-jaran jubileon. La solenaĵo okazis en nia renkontiĝejo ĉe la restoracio Blumeneck. Ĝi komenciĝis je la 16-a horo. Floroj starantaj sur la tabloj donis al la salono festan aspekton.

Kunvenis 17 personoj, ankaŭ tiuj, kiuj venas tre malofte, aŭ kiuj en la lastaj jaroj

eĉ neniam venis. La kunvenon malfermis la prezidanto Stanislaw Pochanke, bonvenigante gastojn. Pri la fondiĝo kaj historio de la klubo rakontis ties fondinto kaj unua prezidanto Hans Kästli kaj la sekva prezidantino Hildegard Schoch, kiu gvidis la klubon pli ol 10 jarojn.

Pri la aktiveco de la klubo precipe en la komenco de ĝia ekzisto rakontis ankaŭ Leonie Sennhauser, la plej regula vizitanto de la klubo de ties fondiĝo ĝis nun. Barbara Pochanke rakontis pri la diversforma reciproka helpado inter la esperantistoj laborantaj en la Psikiatria Klinikio Wil, kie la klubo fondiĝis. Helpon precipe moralan bezonis antaŭ ĉio eksterlandanoj, kiuj ne konis la germanan lingvon kaj laboris unuafoje en flegado.

Dum la kunveno Verena Chaves-Walder tradukis ĉion al gasto, la ĵurnalistino Christoph Oklé, kiu skribis poste favoran artikolon pri la kunveno kaj pri esperanto en la loka gazeto « Wiler Zeitung ».

La solenaĵo kaj amika babilado daŭris ĝis la vespero kaj mi pensas, ke ĝi restos longe en la memoroj de la kunvenintoj.

Stanislaw Pochanke



**La tri sinsekvaj prezidantoj de la klubo:
Hans Kästli, Hildegard Schoch kaj Stanislaw Pochanke**

En julio la Wil-aj klubanoj renkontiĝis en la minigolfejo de la Psikiatria Klinikio por ludi minigolfon. La ludo estis agrabla kaj emociiga. Partoprenis ĝin ankaŭ juna gasto, Luko Allemand el La Chaux-de-Fonds.

Venontaj kunvenoj

Novembre 3: Pri la 56 IFEF-Kongreso en Sopron (Hungario) raportos Ernst Glättli.

Decembre 1: Zamenhofa vespero, 145-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, kun Stanislaw Pochanke.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld
Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>
reto: www.esperanto.ch/zuriko

Programo

Ni renkontiĝas la 2-an dimanĉon en la monato posttagmeze por libera kafumado de la 14-a ĝis la 17-a horo.

Ĉiujn merkredojn vespere de la 19-a ĝis la 20-a horo (krom dum la lernejoj ferioj) okazos konversacia kurso por komencantoj kaj personoj kun bazaj konoj. Kotizo: Fr. 12.- por vespero. Oni povas partopreni daŭre aŭ nur unuopajn vesperojn. Necesas ĉiam telefoni aŭ persone anticipe aliĝi (sub telefono 044 251 50 25 ĉe Nelida Weidmann).

Libroj

Nove aperis en Svislando

Antaŭ nelonge aperis tri novaj tradukoj de Willy Nüesch el la verkaro de Rudolf Steiner. Sur trideko da paĝoj tiuj broŝuroj ebligas bazan enkondukon en la penso-mondon de la aŭtoro.

Reenkoriĝo kaj karmo: imagoj necesaj el la starpunkto de la moderna naturscienco

Rudolf Steiner multe okupiĝis pri la filozofio de la 19-a jarcento, precipe pri la filozofio de la natursciencistoj (Haeckel, Darwin). Li havis la konvinkon ke ankaŭ por la esploro de la animo oni devas apliki la saman pensmanieron kiel por la vera naturscienco. Ekzemple en la 17-a jarcento la ĝenerale akceptita opinio pri la generado estis, ke insektoj, vermoj kaj fiŝoj ekestas el ŝlimo. Post la eksperimentoj de Pasteur la sciencistoj formulis naturan leĝon, laŭ kiu « Ĉio viva ekestas el io viva ». Same Rudolf Steiner postulas psikologian leĝon, laŭ kiu « Ĉio anima ekestas el io anima » – kaj pritraktas la ligojn inter la reenkarniĝoj kaj la karmo-leĝojn. Li ankaŭ kritike pritraktas la tiurilatajn opiniojn de la sciencistoj.

Kiel karmo efikas

La konkludo de la antaŭa demonstro estis, ke la natursciencia pensmaniero, se ĝi nur vere komprenas sin mem, kondukas al la praantikva doktrino pri

la evoluo de la eterna homa spirito tra multaj vivoj. Ĉi tie Rudolf Steiner montras, en kiu senco la vivo de la homo estas la efiko de liaj antaŭaj enkorpiĝoj kaj kiel ĝi fariĝas kaŭzo de la postaj.

Kiel mi trovas la Kriston ?

Rudolf Steiner respondas al ĉi tiu demando prilumante la individuan strebadon al ekkono de la forto, kiu manifestiĝis en la persono de Jesuo Kristo kaj daŭre plu efikas. Pri tio la hodiaŭa homo ofte indiferentas aŭ havas negativan sintenon. La aŭtoro priskribas la vastajn historiajn kaj supersensajn interligojn de la Golgota mistero kaj la vojon al la ekkono de Kristo – kiu havas por li centran signifon en la evoluo de la homo kaj homaro.

La broŝurojn oni povas mendi rekte ĉe la tradukinto Willy Nüesch, Brückfeldstrasse 11, 3012 Bern, telefono: 031 302 66 56, aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Richard Schneller.

-oOo-

Poezio

La tempo

Luc Allemand

La antaŭo, ĝi ne ekzistas
Pasinteco estas nur memoraĵo
Oni ĝin memoras

Oni ĝin konas aŭ ne konas
Sed io estas certa: oni ne ĝin vivas.

Ĉi tiam, ĉi tie mi estas
Nun mi pensas kion mi pensas
Vivon mi sentas
Mi vidas kion mi vidas
Mi vivas kion mi vivas nun.

Poste, ĉu mi ankoraŭ estos?
Mi ne scias; tio ne okazintas
La posta nuno malsamos
Kion mi vivas mi ne plu vivos
Tiam oni vivos kion oni ne nun
vivas.

La sola vera momento estas la
nuntempo
Pasinto fariĝas kiam oni jam estas
elirinta ĝin
Futuro estas antaŭ ni, neniu
neniam ĝin kaptos
La nuno nuna, sola kion ni vivas
estas ununura
Tamen, ĝi ŝanĝiĝas senĉese,
transformiĝas.

Recenzo

Klaro kaj elasto

Festlibro por la 80-a naskiĝtago de **Fernando de Diego (1999-11-02)**. Edition Iltis, Schliengen 2003, 422 paĝoj kun bibliografio kaj biografiaj notoj pri la kontribuintoj.

Ĉi tiu libro estas bela omaĝo al unu el la plej fekundaj tradukistoj en esperanto ĉefe el la hispana. Oni konas Fernandon de

Diego ankaŭ kiel eseiston kaj recenzanton same kiel leksikografon por la granda vortaro hispana-esperanta (2003). Fine de la volumo troviĝas utila 31-paĝa bibliografio de lia verkaro. Uverture Miguel Fernández omaĝas al la jubileanto per metaforriĉa odo. Reinhard Haupenthal enkonduke situas la verkadon de Fernando de Diego rilate la Iltisan skolon (Piĉ, Vatré, Haupenthal). Sekvas interesa aŭtobiografia skizo de Fernando de Diego montranta lian vivovoĵon ekde nefacila junaĝo dum la hispana interna milito – sekvata de la dua mondmilito kaj postmilita periodo de severa frankista reĝimo –, instaligo kaj prospera vivperiodo en Venezuelo ĝis la fina domicilio en Pollando. (Pli detale en *Sennaciulo*, majo 2004, p. 77.)

La unua kontribuo en la literatura parto de Ada Csiszár pritraktas la pseŭdonimojn de Káláman Kalocsay. La prizorgantino de lia spirita heredaĵo senvualigas eĉ la «sepsigele sekretajn» plumnomojn, kiuj dum pli ol du jardekoj estis «severe enŝlositaj».

Kurisu Kei rakontas en *De «kamarado» al «ambasadoro»* siajn spertojn de profesia tradukisto unue el esperanto al la japana kaj poste de la ĉeĥa al la japana kaj kiel li iĝis «ambasadoro» de la ĉeĥa literaturo en Japanio.

Carmel Mallia en *Du ĝemelaj voĉoj* komparas poemojn de L. L. Zamenhof kun tiuj de la malta poeto Dun Karm kaj reliefigas la komunajn trajtojn.

Carlo Minnaja pritraktas *La unuajn dek jarojn de Literatura Foiro* (1970-1979), la plej longdaŭra esperantliteratura revuo, al kiu en tiu periodo ĉefe kontribuis italoj (inter aliaj ankaŭ la aŭtoro de la artikolo) kaj kiu ofte estis redaktita ĉu de Giorgio Silber ĉu de Perla Martinelli.

La du sekvaj eroj prilumas la gravan baltan kontribuon al la esperanta literaturo: de Saulcerĉite Neilande *La latva kontribuo al la esperanta literaturo* kaj de Jaan Ojalo *Cent jaroj da estona literaturo en Esperanto*.

Annakris Szimkat analizas *La recenzajn rubrikojn de la revuo «Dialogo» (1973-1988) kun aparta konsidero de la recenzoj de Fernando de Diego*. Li konkludas: «La recenzojn de Fernando de Diego ĉiam karakterizas rigoro: tio validas por la laŭdoj (li ne ŝparas ilin, kiam la verko tion permesas) kaj por la draŝoj. Se iam kompiliĝos antologio de modelaj recenzoj, en ĝi sendube figuros pluraj de Diego.»

Eli Urbanová lerte kaj konvinke enkondukas la temon pri neologismoj per la kontribuo *Josef Rumler (1922-1999) kaj la Praga skolo*. Pri la problemoj sin okupis jam Baghy kaj Kalocsay. Tiu lasta analizis la situacion interne de la esperanto-movado en sia libro *Lingvo, stilo, formo*: «La propagandisto volas facilan Esperanton... La literaturisto volas riĉan lingvon...» – jen la antipodaj starpunktoj. Oni povus karakterizi la sintenon de Josef Rumler per lia lapidara formulo: «Dum por stilo komuna validas la devizo «necese kaj sufiĉe» kaj en stilo faka regas la devizo «koncize kaj precize», en arta stilo funkcias la regulo «abunde kaj redunde.»

Josef Rumler, ĉeĥa poeto kaj lingvisto, favore impresis Juan Régulo Pérez, kiel montras Reinhard Haupenthal en sia tradustudo de leteroj inter tiuj du personoj kaj Eli Urbanová titolita *Régula recepcio de Rumler*.

Sekvas la biografio de Ĉestmír Vidman pri *Jiří Karen (1920-2000) kaj lia kontribuo al la esperanta literaturo*, konata ĉeĥa poeto kaj esperantisto, kiu publikigis ankaŭ sub sia propra nomo Ladislav Podmele fakajn pedagogiajn verkojn en la ĉeĥa.

En *Ambaŭ Zamenhofaj Alfabetoj* de la ĉapitro «Lingvo» André Albault meditas pri kelkaj problemoj de la fundamenta alfabeto kun diakrita supersigno kaj la fundamenta help-alfabeto kun diakrita litero (h), kiuj akriĝis, kiam aperis la nova tekniko de retmesaĝoj kaj lastatempe parte

trovis solvon per Unikodo en novaj ĝisdatigitaj krozoj.

Sabine Fiedler prezentas la unuan esploron *Pri frazeologio en la «Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana» de Eugen Wüster (1898-1977)*. Ĝi ĉefe baziĝas sur la aperintaj kvar unuaj volumoj (1923-1929). La parto *Korno ĝis Z* troviĝas kiel manuskripto en IEMW en Vieno. Pri la graveco de tiu vortaro Sabine Fiedler citas K. Kalocsay: «... la vortaro estas nemalhavebla ne nur por Esperantistoj-filologoj kaj vortaristoj, sed per sia abunda frazeologio ĝi estas kvazaŭ plej supera lernolibro por ĉiuj tradukistoj kiuj volas funde koni la lingvon kaj volas alproprigi ĉiujn trezorojn en ĝi amasigitajn, sed ĝis nun pene alireblajn ...»

Reinhard Haupenthal kontribuis per du prilingvaj artikoloj: *Ni bezonas historian vortaron kaj Kritika analizo de «Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch de Erich-Dieter Krause»*. En la unua la aŭtoro metas nin antaŭ la (manke de dokumentoj) neresponebla demando: «Kiu, kiam, kie unuafoje uzis difinitan vorton?» Li konstatas ke respondo al tiu demando povus doni nur historia vortaro. Li starigas kelkajn principojn, kiuj devus gvidi la el-laboron de tia konsultlibro. – La apero de la granda vortaro esperanto-germana de Krause ĝenerale ĝojigis la germanlingvanojn, ĉar ĝia aktualeco, amplekso kaj materia prezento estas impresiga (bedaŭrinde ne sekvis la parto esperanto-germana). Sed kompreneble oni povas trovi mankojn kaj ne konsenti pri iuj punktoj. Haupenthal metas ĝin sub tre kritikan lueon, ĉar li timas, ke «... dirigisma stirado de la lingvo per Krause ne povas esti en la intereso de Esperanto».

La ĉapitron «Movado» malfermas Andreas Künzli per notoj pri forgesita «samideano» kaj ties reelfositaj verkoj: *Auguste Forel (1848-1931) kaj la vojo al la kulturo*. Tiu «... eksterordinara svisa

klerulo kaj sciencisto – kuracisto, psikiatro, formikologo, cerbanatomisto – social-higienisto, verkisto, socia aganto... ne apartenas al la esperanto-movado en la kutima aktivula senco, sed lin eblas listigi al la klasikaj teoriistoj de la mondhelplingva ideo kaj de la esperanto-movado». Mi konfirmas la konstaton de Künzli, ke la aŭtobiografio de Forel *Rückblick auf mein Leben* (1935, franclingva titolo *Mémoires*) «estas ege ĝuinda legaĵo» same kiel la kontribuo de Künzli pri tiu iriza personeco estas nepre leginda.

Antonio Marco Botella, historiisto de la hispana esperanto-movado, priskribas la vivon kaj verkaron de Julio Mangada Rosenörn (1877-1946), generalo, pioniro de la movado en Hispanio kun organizaj talentoj kaj tre energia defendanto de esperanto, kiun Zamenhof persone konis kaj subtenis. Mangada estis forta karaktero, kiu travivis sukcesojn kaj mal-feliĉojn dum ofte tumultaj tempoj.

Sekvas longa artikolo en la hispana de Gabriel Maria Verd-Conradi pri *La nacionalidad y las lenguas de L. L. Zamenhof*.

En la sepa ĉapitro «Traduk-arto» Adolf Burckhardt per sia kontribuo *Germana literaturo en traduko de Reinhard Haupenthal* prezentas la imponan vicon de libroj kaj kajeroj el sume 1260 paĝoj. Unue li atentigas pri la ekstretoj de tradukebloj, kiuj varias de traduko absolute fidela al la originalo ĝis «dinamisma» rekreado. La tradukprincipoj de Haupenthal certe apartenas al la dua kategorio. Burckhardt ne povas konsenti kun ĉiuj el tiuj kriterioj kaj esprimas iajn dubojn, sed li agnoskas, ke multaj eroj el la klasika germana literaturo (la plejparto el la deknaŭa jarcento) ricevis modernan ekvivalenton en esperanto. Li ĉiĉeronas nin «tra la pitoreska pejzaĝo de la haupenthalaj tradukoj» kaj invitas nin al propra esploro de verkoj el Hauff, Bürger, Goethe, Büchner, Eichendorff, Heine, Lessing, C. F. Meyer, Keller, Schiller,

Droste-Hülshoff, E. T. A. Hoffmann, Kleist, Kafka, Fontane, ktp.

Zdeněk Hršel dediĉas sian kontribuon al *Miloš Lukáš (1897-1976) kiel Esperanto-tradukisto*. La gimnazia profesoro Miloš Lukáš estis poligloto uzanta preskaŭ kvardek lingvojn, klasika filologo, tradukanto al esperanto el la ĉeĥa kaj poeto.

La temon *Esperanto kiel lingvo por traduko de beletraj verkoj* pritraktas Li Shijun (plumnomo Laulum), kiu insistas pri la graveco de tiaj tradukoj, ĉar ili riĉigas kaj perfektigas la lingvon. Post interesaj konsideroj al la solvendaj tradukproblemoj, ĉerpante el siaj tradukspertoj el la ĉina, li venas al la konkludo ke «Kompromiso inter skemismo kaj naturismo estas dezirinda por solvi la problemojn en uzado de Esperanto kiel lingvo por traduki beletraĵojn».


Daniel Luez, kiu scias la hispanan sed kies gepatra lingvo estas la franca (cetero li elfrancigis du Maigret-romanojn de Georges Simenon), admiras en la kontribuo *Ĉirkaŭ la traduko de «Cigana Romancaro»* Fernandon de Diego pro lia lerto en la solvo de multaj tradukproblemoj de tiu poemaro de Federico

García Lorca : «... perfekta traduko de mirinda ĉefverko, kiu estas mem alia ĉefverko de nia Esperanta literaturo.»

Finas tiun libron de vere legendaj kontribuoj Henri Vatré per *Ĉirkaŭ la traduko de «Boule de Suif»*, fama novelo de Maupassant esperantigita de Fernando de Diego. Post kelkaj vortstatistikaj konsideroj pri neologaj aŭ poeziaj formoj registritaj en PIV aŭ ne-pivaj, la uzo de la sufikso mal-, la evito de la verbo esti kaj la vortkunmetoj, Henri Vatré notis kelkajn parolturnojn komparante la francan originalon kun la esperanta traduko. Li konkludas ke «... la brila traduko helpis al mi pli bone kaj pli intime percepti la profundan signifon de la originalo, kvankam la franca estas mia gepatra lingvo.»

Richard Schneller

-oOo-



Kongresen

Miaj unuaj ferioj en esperantujo

Dum la komenco de julio mi havis agrablan okazon vivi en esperantista familio en Wil; bela regiono de germana Svisio: Post mia peto, gesinjoroj

Pochanke, kiujn mi tute ne konis antaŭe, invitis min. Mi iris trajne kaj ili venis serĉi min ĉe la stacidomo. Mi estis farinta kaj metinta ĉe mia vesto insignon de esperanto, por ke ili vidu, ke estas mi.

Mi estis sendinta mian biciklon kaj sinjoro Pochanke pruntedonis al mi mapon

de la urbo kaj regiono. Tiel mi vizitis la regionon bicikle, trovis belajn vojetojn en la arbaro, ĉe la rivero kaj tiel plu, kelkfoje sub pluvo, sed tamen estis tre agrable.

Per la trajna ĝenerala abono de s-ro Pochanke mi povis veturi kun li ĝis "Svisio miniatura" kaj Lugano, kiam nur en Tiĉino suno brilis. Ni akaŭ iris al Stein am Rhein kaj al la "rejnaj akvofalegoj".

Mi partoprenis al renkontiĝo de Esperanto-Klubo Wil en minigolfejo.

Ni parolis kompreneble nur esperante. Estis tre bone por mi, ĉar miaj gepatroj ne parolas esperanton, do ĝenerale mi ne havas tian okazon praktiki esperanton dum pluraj tagoj.

Mi ankaŭ aŭdis paroli iom da pola en la familio kaj kompreneble da svisgermana en la urbo.

Hejme s-ro Pochanke instruis al mi iom da historio, ni kuiris kelkfoje kune, ili malkovrigis al mi bonajn specialaĵojn.

Mi havis agrablajn feriojn en Wil. Dankon al la familio Pochanke!

Luko Allemand

Esperantumi en Ĉeĥio

Iomete hazarde mi estis elektinta, inter cento da plej diversaj proponoj aperigitaj en *Heroldo de Esperanto* de marto 2004, kongreson de KELI je la fino de julio. KELI estas Kristana Esperantista Ligo Internacia. Ne-membroj estis kore invititaj.

Mi tute ne bedaŭras tiun elekton. Senproblema vojaĝo: nokta trajno de Zuriko al Vieno. Ŝanĝante trajnon en malgranda ĉeĥia stacidomo mi subite ekaŭdas esperantan alparoladon inter vojaĝantoj renkoninte unu la alian: - „Ĉu ankaŭ vi iras al KELI-Kongreso?“ Rapida konatiĝo. Poste ni triope vojaĝos ĝis la celo: Bystrice pod Hostynem, ĉarma moravia urbeto. Surloke okazas amika akcepto.

La kongreso plenokupas la ripozdomaron SOLE GRATIA de Evangelia Eklezio

de Bohemia Kunfrataro. Entute 60 partoprenantoj el 12 landoj, donante bildon de 10 gepatraj lingvoj. La nuraj du svisoj ne parolas la saman gepatran lingvon!

Semajno riĉa je kantado, prelegoj, ekskursoj, koncertoj, bibliaj studoj kaj meditadoj, personaj kontaktoj. Partopreno al diversaj faradoj estas tute libera.

Pluraj junuloj el Rumanio estas esperanto-komencantoj. Por ili organizas ĉiutage juna nederlandanino apartan kunvenon pli ludan.

Miaflanke, la plej bonaj momentoj estis tiuj, kie ni povis babili aŭ diskuti, kiel manĝoj kaj ekskursoj, sed ankaŭ la preskaŭ ĉiutaga horo de kantado. Inter ni estis muzikistoj, kiuj larĝe kutimigis nin kun la nova ekumena kantlibro « *Adoru* ». Ho ! la belaj rondkantoj!

Mi ĝis nun neniam estis en Ĉeĥio. Mi revenas el Moravio kun belaj mensaj bildoj: la naturaj cerealaj kampoj kovrante pli ol duonon de la lando, la pentrinda malnova trajneto, kiu veturskuante alportis nin, la buntaj francartaj ĝardenegoj de vizitataj kasteloj, la centjaraĝaj arboj ĉirkaŭ la kongresaj domoj. Plie, evidente, la multaj amikaj vizaĝoj de samideanoj samtempe samkredantoj.

Tutcerte mi refaros similan travivaĵon.

André Sandoz

El la UK

Raporto pri la Universala Kongreso (UK) de UEA, somero 2004, Beijing / Pekino, Ĉinio, kaj la postkongresa ekskurso.

Forveturo al Ĉinio la 22-an de julio por esti akurate je la unua komitatkunsido sabate la 24-an. Mia edzo akompanas min por viziti la ĉinan ĉefurbon kaj partopreni postkongresan ekskurson al provinco Xinjiang, provinco en la nord-okcidenta parto de Ĉinio, norde de Tibeto. Rehejmenigo la 9-an de aŭgusto.

La Kongreso : pli ol 2'000 partoprenantoj el pli ol 50 landoj, inter ili 800 ĉinoj

kaj 200 japanoj. La temo: Lingva egaleco en internaciaj rilatoj. Ok ĝis dek prelegoj okazis paralele samtempe dum la tuta semajno; la elekto estis malfacila por scivolemaj kongresanoj. Mia edzo povis partopreni paroligajn rondojn. Li ankaŭ povis partopreni kelkajn ekskursojn sen mi dum mia deĵorado en la Kongreso. Plie mi povas dum UK retrovi geamikojn el la tuta mondo, kiuj kiel mi estas fidelaj je tiu granda ĉiujara renkontiĝo, dum kiu la esperanta komunumo ekzistas korpe. Estis agrable ekrilati rekte kun ĉinoj, demandi al ili pri ilia lingvo, pri la prononco de «nihaŭ», saluton, aŭ «ŝeŝe» dankon. Tamen multaj estis komencantoj.

La nacia vespero estis belega prezento de ĉina folkloro kun diversaj dancoj.

Partoprenis proksimume 10 svisoj. En la komitato de UEA mi membras ekde 1998 nome de Svislando. 2004 estis elektojaro, nova komitato do naskiĝis, ĝi konsistas el proksimume 70 membroj. Ĝi similas al Ĝenerala Asembleo de UN; estas po unu persono por ĉiu lando, plie estas reprezentantoj de la fakaj asocioj ligitaj al UEA. Proksimume 50 el tiuj membroj venis al Pekino. La estraro estis nove elektita : elektiĝis 4 virinoj (el Kubo, Francio, Svedio, Nederlando) kaj 3 viroj (el Italio, Israelo kaj Ĉinio). Okazis du premieroj ĉe tiuj elektoj: la plimulto virina en tiu estraro kaj la elekto de ĉino. La reprezentantoj de nia gastiganta lando tre fieris pri tio.

Akcepto de unuafojaj kongresanoj. Temas pri hora prezento de la kongreso kaj de ĝiaj multifacetaj aktivecoj. Mi ricevis la taskon prezenti tiun parton. Fakte mi bone konas la kongresojn, ĉar mi partoprenas ĝin regule ekde 1998.

Prilingvaj ekzamenoj. Kelkaj esperantistoj deziras scii, kie ili staras pri sia lingvokapablo. Por tio ekzistas lingvaj ekzamenoj je elementa kaj meza niveloj. Por povi instrui esperanton en kelkaj landoj, oni devas posedi la diplomon pri lingva ekzameno. En 2004 mi reduktis

mian partoprenon: mi nur ekzamenis la kandidatojn dum la parola parto de la ekzameno. Ĉiam estas ege interese aŭdi la kandidatojn. Sukcesis 3 japanoj, 2 ĉinoj kaj unu vjetnamano, aliaj ne sukcesis ĉe la antaŭtesto aŭ dum la skriba parto.

Tago de la lernejo. Dum tiu prelegaro mi povis ekscii multon pri la ĉina lernejsistemo. Mi prelegis pri mia instruado de konfliktoŝolado. Mi ĝojis denove kunlabori kun mia amikino el Aŭstralio Jennifer Bishop.

Internacia arta vespero. Temas pri la lasta vespero, fina bukedo de la Kongreso. Jam dufoje en 2002 en Fortalezo kaj en 2003 en Gotenburgo mi okupiĝis pri tio. Tiun ĉi jaron mi sciis, ke mi devos kunlabori kun sinjorino Wang. Fakte estis ŝi kaj juna viro sinjoro Jiang. Tiu kunlaboro fariĝis ne tre facila pro diversaj kaŭzoj: lingva kapablo unue kaj kompetentecoj pri decido. Tute juna, sinjorino Wang volis aŭ devis mem decidi, sed mi tamen volis argumenti, ekzemple por havi grupon el Nepalo, kiu ne kantis tre profesie, ĉar ŝajnis al mi, ke indas havi reprezentantojn el tiu lando. Mi deziris kunlabori per interkonsento, sed ne ĉiuj personoj kutimas uzi tion, kiel la svisoj. Finfine ni bone sukcesis kaj ĝuis pri la komuna prezento. Alia aspekto: kiam endis diri ne al ne tre juna ĉino, sinjorino Wang estis kontenta, ke mi faru tion... Ŝi informis min, ke ŝiaj superuloj postulis, ke la lasta parto estu ĉina. Mi sentis tion kiel premon, plie mi ne sciis, kiu estis tiuj superuloj... Ŝajnas, ke tio estas tipe ĉina. Dum tiu vespero estis dancoj, muzikecoj el Koreio, Nepalo, Litovio, Italio, Serbio, Bharato (Hindio), Belgio, Germanio. Pluraj kantoj de la internacia koruso kaj du pianopecoj luditaj de sinjorino Novin el Milano plezurigis la geaŭskultantojn (ŝi diplomiĝis en Ĝenevo kun la tiama direktoro Henri Gagnebin, mia praonklo!). Okazas mirakloj en Ĉinio! La mondo estas vere eteta!!

Ĉiuj taskoj ligitaj al la preparo de tiu vespero (po unu kunveno ĉiutage) havis politikan aspekton. Ekzemplo: Tibetanoj estis preparintaj dancon. Ilia esperanto-instruisto gvidis ilin. Dum provludo mi petas, ke mi povu vidi tiun dancon. Kiam ili finis danci, la instruisto anoncas al mi, ke ili ankoraŭ preparis kanton. Mi diras, ke mi deziras aŭdi la kanton kaj ke mi poste elektos inter la danco kaj la kanto. En soldateca vico ili kantas. Mi demandas la instruiston pri la signifo de la kanto. Li diras: «Tibetanoj estas kontentaj kaj fieraj esti ĉinoj.» Mi ne devis longe pripensi. Mi diras: «Ili dancu!». Mi gluas etiketojn «FREE TIBET» sur miaj kovertoj...

Mi estis preskaŭ atakata de personoj, kiuj nepre volis prezenti programeron dum tiu vespero. La unua persono volis, ke lia filo ludu ĉinan violonon. Mi jam estis aŭdinta lin: li havis bonan teknikon sed ludis malĝuste. Mi jam estis dirinta NE. «Sed mi estas prezidanto de la asocio ... en la provinco... ; mi estas vic-prezidanto de la instituto ... !!! » Denove premoj, ĉekorpe, same kiel kun la surstrataj vendistoj.

Mi tre ŝatas la preparlaborojn kaj la prezenton de tiu internacia arta vespero. Oni bezonas diplomatisencon. Miaj interkulturaj interesoj estas bone uzataj kaj la prezento antaŭ plenplena salono ne timigas min.

Ni estas gastoj de la Ŝtato por viziti la Grandan Muron kaj la Tombejon de la imperiestroj Ming, kaj nur en tiu okazo sesporda polica aŭto veturas antaŭ ni, nia karavano konsistas el kvar busoj. Ni rajtas traveturi ĉe ruĝa lumo, ni povas eviti grandan trafikon, ni estas portataj ĉe la pordon de la vidindaĵoj. En musona tre alta temperaturo kaj humideco ni ĝojas ne devi marŝi de la parkejo al la pordo.

Kontaktoj kun la svisa ambasadejo en Pekino. Mi kutimas kontakti niajn reprezentantojn en la kongresa urbo. En Beijing temas pri sinjoro Lukas Schifferle, kultura ataŝeo. Ĉar li ne povis kontakti min

per ĉela telefonaparato, li trovas min ĉe komitatkunsido. Ni kune trinkas teon en la kongresa trinkejo. Dum 90 minutoj ni interŝanĝas ideojn kaj informojn pri esperanto, Svislando, Ĉinio, ktp. La fakto ke diplomato venis al la kongresejo por paroli kun mi forte impresis miajn gekoleginojn el aliaj landoj.

Varmeco, humideco, polucio apartenas al la memorajoj, kiujn ni gardos de Beijing. La kulturaj trezoroj, kiujn ni vidis, estas kompreneble imponaj. Mi tamen havas preferon por la sobereco de la japana arto.

Mallonga restado en Xi'an, provinco Shaanxi por vidi la soldatojn el argilo. Tiu ripozanta armeo meritis pli longan komenton. Detaloj pri vestaĵoj kaj pri aparaturo ŝajnas esti sen rilatoj kun la tempo, same ĉe la romiaj legioj.

Ekskurso en la provinco Xinjiang, en la regiono, kie vivas la popolo Ujgura. Ĉina gvidanto parolas ĉine al ĉino, kaj tiu lasta tradukas al esperanto. Dum plena semajno ni povas malkovri tiun regionon ĉe la bordo de la dezerto Takla Makan: montoj el nudaj ŝtonoj, sabloj, dunoj. La ujuguroj pensigas nin pri mongoloj aŭ pri kartveloj en Kaŭkazio. Ili estas tre afablaj kaj ĝojaj kaj ne tiom ĝenas nin, kiel la ĉinoj, kiam ili klopodas vendi ion al ni. Post nia itallingva, japanlingva kaj franclingva kantado en la buso ni lernas kanton en la ujgura lingvo kun nia gvidanto, kiu estas aparte ĝoja transdoni al ni iom de sia amo al sia lando kaj ties kulturo.

Rehejmenigo dum tridekora tago de Beijing al Les Brenets, foriro je 7 h 30, alveno je 23 h 10 kun 6 pliaj horoj de la horiferenco. Lunde mia laboro en la lernejo rekomenciĝos..

Mireille Grosjean.

(Tiu raporto ankaŭ ekzistas en la lingvo franca.)